

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 7-a parto
Claude Gacond, 147-a radioprelego, 1966.07.27 & 1966.07.30

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ni promesis pasintsemajne, ni revenas al la prelego, kiun faris la franca eksministro Jules Moch en la Nica Kolokvo. En tiu parolado sinjoro Moch prezentis unue la progreson de la armada tekniko. Due li raportis pri la malarmadaj provoj. Nun trie li demonstris la rilatojn inter la malarmado kaj la subevoluo. Ni resume citos preskaŭ tiun tutan ĉapitron :

A.- La malarmado estas necesa al harmonia evoluo de la mondo. Sole ĝi ebligas ĉesigi la dramon de la subevoluo.

Cl.- La subevoluo estas la plago de la 20-a jarcento. Oni konsideru la produktadon aŭ industriigon, oni mezuru la kvanton da energio konsumata laŭ loĝanto, oni graduu la nutran konsumadon laŭ kalorioj, ekzistas ĉiam tri grupoj de ŝtatoj nete apartigeblaj.

A.- Unue la ŝtatoj, kies jara enspezo superas po 1500 dolarojn por loĝanto (ĝi atingas po 3000 dolarojn en Usono), kaj kies loĝantoj uzas do la ekvivalenton de po 4 ĝis 8 tunoj da karbo jare kaj konsumas pli ol po 3'100 kaloriojn tage. Naŭ riĉaj landoj respondas al tiuj karakterizoj kaj reprezentas 250 milionojn da loĝantoj, tio estas 8 procentoj de la tera loĝantaro.

Cl.- Dua grupo de mezriĉaj ŝtatoj posedas nacian enspezon, kiu varias inter po 1550 kaj 500 dolaroj por loĝanto. La loĝantoj uzas la ekvivalenton de po 2 ĝis 4 tunoj da karbo jare kaj konsumas inter po 2'400 kaj 3'100 kaloriojn tage. Tiu grupo sumas 17 ŝtatojn, inter ili troviĝas Francio kaj Sovetio. Ili reprezentas 500 milionojn da loĝantoj, tio signifas 17 procentojn de la tera loĝantaro. La kunigo de ambaŭ unuaj grupoj sumas nur unu kvaronon de la homoj vivantaj sur la tero, la tri aliaj kvaronoj konsistigas la malsatantajn landojn.

A.- Estas bedaŭrinde vere, ke 75 procentoj de la tera loĝantaro suferas pro malsato, konsumas malpli ol po 2'400 kaloriojn por kapo kaj tago, malpli ol la ekvivalenton de po 2 tunoj da karbo jare, kaj vivas per individua enspezo, kiu malsuperas po 500 dolarojn kaj malaltiĝas eĉ ĝis po 50 dolaroj en la plej mizeraj landoj.

Cl.- Konkludo : eta malplimulto posedas la grandan plimulton de la mondaj riĉaĵoj ; fakte 75 procentoj de la tera loĝantaro posedas nur 15 procentojn de la enspezoj, dum la 25 restantaj procentoj posedas 85 procentojn de la produktado.

A.- La neegaleco senĉese graviĝas. La proporcio inter la enspezoj en Usono kaj en la subevoluintaj landoj estis 15 kontraŭ 1 en 1928 ; hodiaŭ ĝi estas 35 kontraŭ 1.

Cl.- Tio ne povos plu daŭri en epoko, kiam la subevoluintaj popoloj ekkonas sian mizeron, asertis sinjoro Jules Moch. Tio ne devas daŭri, se oni volas eviti la plej teruran internacian socian krizon.

A.- Kia estas la problemo ? Necesas investi utile kaj laŭ la bezonoj de la popoloj. Ĉiuj studoj pruvas, ke estas necese investi 4 procentojn por kreskigi la enspezojn je unu procento.

Cl.- Mi petas vin momente pripensi al tiu koeficiento. Se oni akceptas, ke proksimume 2 miliardoj da homoj sumas enspezon de 110 miliardoj da dolaroj proksimume (po 55 dolaroj por kapo), rezultas, ke kresko je unu procento de tiu enspezo necesigos investadon de 5 miliardoj da dolaroj.

A.- La demografia ekspansio proksimumas po 2 procentojn jare. 10 miliardoj da dolaroj estas do necesaj nur por konservi konstantan enspezon, por eviti, ke la vivnivelo malaltiĝu pro higienaj progresoj kaj pro la longiĝo de la vivdaŭro.

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 7-a parto
Claude Gacond, 147-a radioprelego, 1966.07.27 & 1966.07.30

Cl.- Nun estus necese altigi la vivnivelon en la mondo je po 4 ĝis 5 procentoj jare. Tio reprezentas ĝian duobligon en dekkvin aŭ dudek jaroj. Tio signifas, ke lando, kiu havas enspezon de po 50 aŭ 60 dolaroj por kapo havus post 20 jaroj enspezon de po cent aŭ cent dudek dolaroj, dum ekzemple en Francio ĝi jam superas 1200 dolarojn.

A.- Por altigi tiujn mizerajn enspezojn je po 4 ĝis 5 procentoj jare, estas necesaj, krom la 10 miliardoj da dolaroj destinitaj al la kompenso de la naskiĝaltiĝo, 20 pliaj miliardoj da dolaroj.

Cl.- La necesa sumo do devas atingi 30 miliardojn da dolaroj, se oni volas efektive helpi la plej malfavoratajn popolojn.

A.- Nu, la sumo de ĉiuj helpoj : publikaj aŭ privataj, okcidentaj aŭ orientaj aŭ internaciaj, laŭ ĉiuj kalkuloj, malsuperas po 5 miliardoj da dolaroj jare, dum 10 estas necesaj nur por malhelpi malaltiĝon de la vivnivelo kaj 30 por ĝin altigi je po 4 ĝis 5 procentoj jare.

Cl.- Necesas do aldoni al la nunaj helpoj 25 miliardojn da dolaroj por atingi la modestan programon, kiun mi sugestas, daŭrigis sinjoro Jules Moch. Oni tamen ne povos proponi sepobligi la hodiaŭajn helpojn, nek povos kalkuli pri regiona ŝparado. La problemo ŝajnas nesolvebla, se oni ne rigardas al la hipotezo de la malarmado.

A.- Estas fakte ludo trovi tiujn ĉi enspezojn, ĉar hodiaŭ la homaro elspezas po 120 miliardojn da dolaroj jare por amasigi armilojn tiom terurajn, ke ĉiu registaro scias, ke neniu kuraĝos ilin ekuzi.

Cl.- La tagon, kiam la ŝtatoj akceptos malarmadi, tiam estos facile antaŭvidi klaŭzon en la **Traktato pri malarmado**, kiu diros, ke 20 procentoj de la realigita ŝparado, pro la forigo de la buĝeto de la defendo, ne plu apartenos al la landoj, kiuj reduktas sian armadon, sed alfluos en internacian kason por la lukto kontraŭ la sub-evoluado.

A.- Kiam tiu internacia kaso estos kreita kaj lokigita sub la egido de Unuiĝinta Naciaro kaj administrata duone de la ŝtatoj posedintaj armilojn, duone de la profitantaj ŝtatoj, tiam tiun tagon la problemo de la subevoluinta mondo eksolviĝos.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-